

# BRAZILA ESPERANTISTO

51-A JARO

MARTO 1957

N.º 516

## RIO GRANDE DO SUL RUINOJ DE SÃO MIGUEL DAS MISSÕES



La aŭtoro de tiu monumento estis la granda arkitekto jezuita Lian Batista Primoli (1735-1744). La hakita ŝtono estas rozkolora grejso. La belaj moduroj, pilastroj, kapituloj, garnituroj estis faritaj de la jezuitoj, kun la helpo de la brazilaĵ indigenoj.

51-a Jaro

MARTO 1957

N<sup>o</sup> 516QUOTA ANUAL DE ADESAO A LIGA  
BRASILEIRA DE ESPERANTO  
1956**BRAZILA ESPERANTISTO**

(«O Esperantista Brasileiro»)  
Oficiala organo de

**BRAZILA ESPERANTO-LIGO**

Societo de publika utileco, laŭ registara  
dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921  
Direktoro:

**A. CAETANO COUTINHO**

Respondeca redaktoro (redactor  
principal):

**D-ro CARLOS DOMINGUES**

Administracio kaj Redakcio:

**Praça da República, 54, 1.<sup>o</sup>**

Telefono: 42-4357

Sidejo de la Brazila Societo  
de Geografio

RIO DE JANEIRO — BRAZILIO

Senpaga por anoj de B. E. I.  
Eksterlande: unu dolaro aŭ 15  
respondkuponoj

(De acurdo com os Estatutos todos os membros  
são automaticamente filiados à organização  
mundial)

|  | Cr\$     |
|--|----------|
| Membro Simples: recebe a carteira de sócio, os cupões de serviço e o «Brazila Esperantisto» .....                | 60,00    |
| Membro com direito ao Anuário: recebe o mesmo que o antecedente e mais o Anuário do movimento esperantista ..... | 150,00   |
| Membro Assinante: recebe o mesmo que o antecedente e mais a revista «Esperanto» .....                            | 250,00   |
| Membro Mantenedor: recebe o mesmo que o Membro Assinante ...   | 400,00   |
| Patrono: recebe o mesmo que o Membro Assinante .....   | 1.500,00 |
| Membro Vitalício: recebe o mesmo que o Membro Assinante .....  | 5.000,00 |

Todas as importâncias devem ser remetidas em cheque bancário ou vale postal à

**LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO**

**PRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 1.<sup>o</sup>**

Rio de Janeiro, DF.

**Himno de La Granberjanoj**

Granberjanoj, de tiu ĉi domo  
Histori' al ni estu proviz'  
De la fortoj do kara la nomo,  
Estu nia ĝi vivo-deviz'.

Ho, antaŭen, Granberjanoj,  
Kun firmeco, forto, bril',  
Dio kaj Patruj'! Ni agu  
Por la gloro de Brazil'!

Granberjanoj, l' estonton preparu  
Per laboro kaj per disciplin';  
Ni al lukto kuraĝe ekstaru,  
La Patruj' kiam vokos ja nin.  
Ho, antaŭen...

Granberjanoj, la menson fidantan,  
Korpon sanan kun pura konsci'

Kaj laboron utilan, konstantan  
Ni oferu al nia Naci'.  
Ho, antaŭen...

Granberjanoj, je tago tre ŝata,  
Post studad' nia, post la labor'  
Per honor' de Granbery amata  
Certe montros sin nia valor'.  
Ho, antaŭen...

Kaj senlace luktante, laŭ planoj,  
En fabriko, sur kamp', kun fier',  
Kaj en hejm', bonaj ni brazilanoj  
Servos al la justeco kaj ver'.  
Ho, antaŭen...

(Esperantigis FRANCISCO VAL-  
DOMIRO LORENZ).

# BRAZILA ESPERANTISTO

51-A JARO

MARTO 1957

N.º 516

## CURSOS DE ESPERANTO PARA O XV CONGRESSO

O planeamento do próximo XV Congresso Brasileiro de Esperanto apresenta-se excelente em todos os pormenores graças aos esforços da inteligente e dinâmica Comissão Organizadora, que assim faz jus aos calorosos encômios e agradecimentos dos esperantistas.

Um dos pontos mais importantes dos trabalhos preparativos é, sem dúvida, a realização de cursos de Esperanto em diversas instituições de Niterói, cursos que deverão terminar antes do Congresso habilitando à participação activa numerosos novos samideanos que terão adquirido regular domínio da língua.

Os cursos estão sendo ministrados nos seguintes locais: Departamento Estadual de Estatística, Colégio Bittencourt Silva, Ginásio Nilo Peçanha, Colégio Brasil, Ginásio Maria Teresa e Externato Halfeld. Frequentam-nos muitas dezenas de alunos e as aulas estão confiadas a dedicados sócios do Niterói Esperanto-Klubo.

E' esta uma magnífica orientação que vale não só para o Congresso mesmo, mas também como lição permanente para o nosso Movimento.

A B.E.L. tem sempre sustentado ser necessário não confinarmos os cursos às nossas sedes. Precisamos levar o Esperanto a todos os pontos onde seja possível introduzi-lo, sobretudo às es-

colas, que devem ser invariavelmente o nosso alvo mais visado.

Toda vez que tem havido oportunidade temos, em colaboração com o Brazila Klubo «Esperanto», conduzido os nossos cursos a estabelecimentos de ensino. Citemos o Colégio Pedro II, o Instituto de Educação e o Colégio Militar. Tais cursos ofereceram ainda a vantagem de ser regidos em geral por professores dos próprios estabelecimentos.

Na mesma ordem de idéias é o Concurso anual entre Ginásianos de todo o Brasil que a B.E.L. mantém justamente para estimular o estudo do Esperanto nas escolas de grau médio.

Temos o maior desvelo pelos cursos por correspondência, que funcionam sem interrupção há dezenas de anos. Existem os cursos pelo rádio (no Rio de Janeiro são três as estações que difundem lições de Esperanto: Rádio Ministério da Educação e Cultura, Rádio Roquette-Pinto, Rádio Mundial). Jornais e revistas de grande circulação, como o SESINHO, inserem aulas de Esperanto. Livros dotados de chave dos exercícios possibilitam o estudo sem professor.

Queremos com isso significar que não nos devemos quedar em nossas sedes à espera dos já convertidos. Cumpre projectar muito mais longe a nossa acção, que não deve ter por campo sim-



# Brazila Kroniko

## RIO GRANDE DO NORTE

*Natal* — Jen la nova estraro de la Associação Potiguar de Esperanto, elektita en la 19-a de Januaro: Honora Prezidanto la ŝtatestro S-ro Djalma Maranhão; Prez. D-ro Waldon Pinheiro, Ĝen. Sek. S-ro Arlindo Castor de Lima; 2-a Sek. S-ro Raul Vidal Lemos; Kas. S-ro Pedro Pinheiro; Bibl. F-ino Marlene M. Antunes; Kultura Depart. Prez. Cristalino Regalado Costa.

Dum leciono de E:-kurso, kiun A. P. E. okazigas ĉe la Academia Potiguar

plesmente os nossos limitados arraiais, mas a humanidade inteira, para a qual Zamenhof elaborou a Língua Internacional.

Não constituímos uma seita hermética, e sim um Movimento que visa a atingir todos os homens. Para tanto nenhum terreno é mais próprio para ser lavrado do que a escola, ambiente natural de toda a cultura, portanto também propício ao Esperanto.

Assim o entendeu muito acertadamente a Comissão Organizadora do nosso próximo Congresso. A ele, como aos anteriores, o Movimento será devedor de largas e duradoras conquistas.

A entrega dos diplomas será decerto um dos pontos altos do XV, que se prenuncia brilhante nas suas actividades e fecundo nos resultados.

C. D.

de Línguas, ĝi regalis la ĉeestantojn per sukeraĵoj el Zaragoza, afabla donacitaĵo poŝte sendita de la Grupo Esperantista «Frateco», en Zaragoza, Hispanujo.

## MINAS GERAIS

*Uberlândia* — Nia samideano D-ro C. A. Wutke fervore propagandas nian lingvon. E.-kurso funkcias ĉe la Centro Espirita Fé, Esperança e Caridade.

*Malacacheta* — Areto da instruistoj organizis translokeblan rondon por la lernado de Esperanto, sub la egido de Santa Rita de Cássia, patronino de la urba paroĥo. La rondo kunvenas dufoje ĉiusemajne en la hejmoj de la rondanoj.

## MATO GROSSO

*Campo Grande* — Nia samideanino Maria Ribeiro Serra sciigis nin pri E.-kurso, kiun ŝi gvidas al kelkaj glernantoj. Bonan sukceson!

## RIO DE JANEIRO. D.F.

La 2-an de Februaro, je la 16,30 horo, BRAZILA KLUBO «ESPERANTO» kunvenis en sia sidejo por aŭdi, registritan sur gramofondisko, la tre interesan prelegon de D-ro Ivo Lapenna, eksprofesoro pri Internacia Publika Juro en la Universitato de Zagreb (Jugoslavio), Direktoro de la Centro de Studoj kaj Dokumentado, en Londono, kaj Ĝenerala Sekretario de UEA, pri la temo: La Kultura Valoro de la Lingvo Internacia. La ĉeestantaro aŭdis la prelegon atente kaj plaĉe.

## IGI kaj IĜI

Jam de kelka tempo oni uzas la verbon «igi» sekvatan de substantivo aŭ adjektivo; ankaŭ oni «kreis» la verbon «iĝi», sekvatan de tiuj samaj kategorioj. Ĉe la klasikuloj, krom maloftegaj okazoj, tian kutimon ni *ne* trovas; ĉe Zamenhof *neniam*. Mi mem lasis min treni en tian reton en verkoj laŭde ricevataj de la afablaj recenzistoj; sed mi pensas, ke estas ankoraŭ kaj jam tempo reveni al la «plej kompetenta esperantisto», nome la kreinto de la lingvo.

Verkon de Zamenhof, kiel mi jam plurajn fojojn diris, oni legu kun krajono en la mano kaj folio da papero apude, ekzamenante ĉiun vorton, ĉiun esprimon; penante eltrovi la motivon de tiu aŭ alia konstruo, vidi, ĉu tiun aŭ tiun formon li uzadis sisteme, el kio oni povas konkludi, ke *tia* estas ja la ĝusta formo. Eĉ se tion aŭ alian oni ne tute komprenas, oni *devas* ĝin preni kiel *modelon*, ĉar ja *tiel* skribis la *kreinto de la lingvo*, tiu, kiu ĝin sendube povosciis pli, ol ĉiu ajn.

Se iu legos *atente* la verkojn de la *majstro* (kaj ĉi tiu titolo ne estas io nur flata), li vidos, ke la sola komplemento de «igi» (ĉi tiu ja ekzistanta) estas *infinitivo*; nenie tie estas trovata alia komplemento. La *verbo* «iĝi» ne ekzistas en tiuj verkoj; ĉiam kiam montriĝis okazo, Zamenhof uzadis «*fariĝi*». Kial do oni nun agas alie? — mi demandas. Eble, interalie, tial, ĉar oni simple malkomponas *gramatike* tiujn vortojn kun la finiĝo «igi» kaj kun «iĝi»: «veniĝi = ven + igi», sekve «igi veni»; «klarigi = klar + igi», sekve «igi klara»; «reĝigi = reĝ + igi», sekve «igi reĝo»; «enigi = en + igi»,

sekve «igi ene»; «oftigi = oft + igi», sekve «igi ofta»; «cindriĝi + cindr + iĝi», sekve «iĝi cindro»; «bluiĝi = blu + iĝi», sekve «iĝi blua», k.t.p. Sed el *nur gramatika analizado*, mi pensas, oni ne povus konkludi, ke tiel *devas* esti.

Iu, tiel pacienca kaj humila, ke li analizus la formojn uzitajn de Zamenhof, demandus sin mem: «Kial la majstro uzis «igi -i», dum ne, analogie, «igi -a» nek «igi -o», sed nur «*fari -a*» kaj «*fari -o*»? Post ĉi tiu demando la sintenado de tia prudentulo estus: «Mi vidu, kial tiel okazas, mi penu trovi la kaŭzon de tia «strangaĵo»; tute certe la majstro estas prava, kaj eĉ se mi ne trovos la plenan solvon de ĉi tiu kuroza afero, mi *ne rajtas* agi alie.»

Post longa cerbumado mi ĉi tie prezentas la supozeblan motivon de la pritraktata zamenhofa sintakso.

En ĉi tiu okazo, kiel ankaŭ en aliaj, «*fari*» signifas «estigi», kaj ĉi tiu egalas al «igi esti», aŭ «*fari*, ke (iu, io) estu». Mi interkrampe rimarkigu, ke oni vidas «igi, ke...»; ŝajnas al mi, ke ĉi tiu «igi» ne estas ĝusta: oni efektive «*faras*», aŭ «*agas*» tiel, ke...

En «Marta», p. 50, ekz-e, ni legas: «Mi estigas ŝin reĝino de miaj diinoj», t.e.: «Mi *igas* ŝin *esti* reĝino...», «Mi *faras*, ke ŝi *estu* reĝino...», aŭ, fine: «Mi *faras* ŝin reĝino...». Se «*fari*» estas «estigi», aŭ «igi esti», oni do vidas, ke la verbon «esti» oni ne povas forigi de ĉi tiu *tutaĵo*, kaj sekve ne: «Mi *igas* ŝin reĝino», sed «Mi *igas* ŝin **ESTI** reĝino», aŭ «Mi **FARAS** ŝin reĝino». En «La Faraono», vol. II, p. 112: «Tio *igis* la kronprincon *esti* singarda...»; ne: «Tio *igis* la kronprin-

con singarda». Alivorte: «Tio FARIS la kronprincon singarda».

Kiel pri substantivoj, tiel same ni povus rezoni pri adjektivoj. Ekz-e: «ruĝigi» ne estas la simpla kaj natura «*igi ruĝa*», sed «*igi ESTI ruĝa*». Efektive, ĝi signifas «*igi havi la koloron ruĝa*»; sed «*havi la koloron ruĝan*» estas tio sama, kiel «*esti ruĝa*». Sekve, ankoraŭ ĉi tie oni ne povas forigi la verbon «*esti*»; kaj se la *signifo* de «*ruĝigi*» entenas en si la verbon «*esti*», «*ruĝigi*» estas do «*igi ESTI ruĝa*», aŭ «*ESTIGI ruĝa*», ne «*igi ruĝa*». Sed «*igi esti*», aŭ «*estigi*», egalas al «*fari*»; konklude, «*ruĝigi*» estas «*FARI ruĝa*».

Cetere, «*igi*» ne estas «*fari*», nek «*estigi*»; neniu dirus «*igi tablon*», «*igi taskon*», «*igi ordon*», «*igi nenion*» k.t.p., kiel ankaŭ ne «*igi ion el io*», ekz-e «*igi el neceseco virton*», k.a. En tiaj okazoj ĉiam aperas la ideo de ia «*ekzistajo*» kaj do nepre necesa estas la verbo «*esti*». Sekve, ne simple «*igi tablon*», sed «*igi tablon esti*», *fari*, ke tablo estu, aŭ «*estigi tablon*», «*fari tablon*»; k.t.p.

«*Pluvigi*», ekz-e, ne estas «*igi pluvon*», sed «*igi ESTI pluvon*» aŭ «*ESTIGI pluvon*»; kaj ĉar «*esti pluvo*» estas «*pluvi*», tial «*pluvigi*» estas «*igi pluvi*».

Ĉe verbaj radikoj plus «*ig*» la analizo povas esti tia sama, kvankam nebezona, ĉar, oni scias, ekz-e «*daŭrigi*» estas «*igi daŭri*», «*estigi*» estas «*igi esti*» k.t.p. Tamen, oni povas ankaŭ ĉi tie uzi tiun analizon, ekz-e: «*ĉesigi*» estas «*igi esti ĉesinta*» (ne «*igi ĉesinta*»!), aŭ «*fari ĉesinta*». Nu, «*esti ĉesinta*» estas ja «*ĉesi*» (kvankam ĝi tia ne ŝajnas!), kaj sekve: «*ĉesigi* = *igi ĉesi*». Oni rimarku, ke, se «*ĉesigi*» estas «*igi ĉesi*», oni ne povus diri «*iĝi ĉesinta*», send ja nur «*fari ĉesinta*»! Ĉi tio estas tute natura, kiel logika kon-

sekvenco: la partikipoj, finiĝante per «*-a*», postulus la verbon «*fari*»; kaj ne alian verbon, ankoraŭ en ĉi tiu okazo, ni trovas en la verkoj de Zamenhof.

Alia ekzemplo: «*sidigi*» estas «*igi esti sidanta*»; sed «*esti sidanta*» egalas al «*sidi*», sekve «*sidigi* = *igi sidi*».

En «*Lingvaj Respondoj*» la majstro klarigis: «*La sufikso «ig» per si mem havas sencon tute difinitan (= fari, lasi, kaŭzi)*», kaj daŭrigas: «*ĝi fariĝas neklara...*» (ne «*iĝas*»!). Nu, «*senco*» ne estas «*signifo*»; «*igi*» ne povus do esti uzata anstataŭ «*fari*». Se, ekz-e, «*la ventego faligis la muron*», ĝi *kaŭzis* la falon, sed ne «*igis* la falon»: ĝi «*igis ESTI falon*».

Simile pri «*fariĝi*», ne «*iĝi*», kiel natura sekvo de ĉi tiu rezonado: se oni diras «*fari iun -a*» (aŭ «*-o*»), oni do devas diri konsekvence «*fariĝi (mem) -a*» (aŭ «*-o*»).

Ĉe Zamenhof, mi diris, oni nenie vidas eĉ unu «*igi -a*», aŭ «*igi -o*», kaj des malpli «*iĝi ...*». Ĉe Kabe, unu el niaj plej eminentaj klasikuloj, mi vidis nur *du* «*igi -a*», en lia «*Unua Legolibro*», sed tio estas evidenta plumeraro. Aliflanke, en la F.K., p. 142, sin trovas: «*... io nekonata faris pli rapide bati lian koron!*» Bedaŭrinde ĉi tio preterglitiĝis antaŭ la okuloj de la tiel fervora S-ro Downes.

La Plena Vortaro imagas ian diferencon inter «*iĝi*» kaj «*fariĝi*», asertante, ke *iĝi* «*diferencas de fariĝi per tio, ke fariĝi signifas, ke la subjekto ŝanĝiĝas pro la influo de ekstera kaŭzo, dum iĝi tute ne precizigas la kaŭzon, K havas sekve pli vastan amplekson: kun la tempo la vivo iĝas pli bona*» (ne: *fariĝas, ĉar neniu faras ĝin pli bona*); *iom post iom lia karaktero iĝis tre malgaja k malkonfidema; la ĉielo iĝas mal-*

*hele ruĝa, poste violkolora, k fine griz-blua.*» Kaj aldone: «RIM.: Tiu diferenco ne estas ĉiam severe obeata.»

Mi ne povas min deteni fari kelkajn konsiderojn pri ĉi tiu «regulo».

Unue: estas bedaŭrinde, ke tiu verko ne donas ekzemplojn «paralelajn», por ke oni bone rimarku tian diferencan.

Due: el tio, ke «*iĝi*» tute ne precizigas la kaŭzon, kaj havas sekve pli vastan amplekson, oni prenas al si la rajton ĉiam ajn uzi «*iĝi*», kaj, se oni volas, neniam «*fariĝi*», eĉ tiam, kiam ekzistas ia «ekstera kaŭzo»; certe, ni konsentu laŭ tiu fantazia regulo, «*fariĝi*. estus ĉi tie «pli ĝusta», sed, laŭ la «pli vasta amplekso» de «*iĝi*», ĉi tiu ne estus erara.

Trie: ni ekzameni la donitajn ekzemplojn. Estas dirite: «... la vivo *iĝas* pli bona» kaj, emfaze: «ne: *fariĝas*, ĉar neniu faras ĝin pli bona». Nu, mi demandas: ĉu do *la vivo per si mem* pliboniĝas, simile al iu estulo?! Ĉu ne *la homoj* ĝin ja plibonigas? En la sekvantaj du ekzemploj oni efektive «perceptas» ian *kaŭzon*: la ŝanĝiĝo de «*lia*» karaktero aŭ de la koloro de la ĉielo nepre havas ian *kaŭzon*, kvankam nesprimitan; ĉu ia *kaŭzo*... «*interna*»? Sed tia «latenteco» estas ja eco de la *sufikso* «*iĝ*» mem, de ia verbo «*iĝi*», tute ne ekzistanta. Kiam oni diras: «la fenestro (mal)fermiĝis», oni ankaŭ tiam ne klarigas la «agiginton»; tamen ia «*kaŭzo*» nepre ekzistis. Ĉu ni dirus, disvolviĝante: «la fenestro *iĝis* (mal)fermita» — ĉar oni «ne precizigas la *kaŭzon*», aŭ «... *fariĝis*...» — ĉar agis «la influo de ekstera *kaŭzo*? La defendantoj de tia harfenda sistemo, mi pensas, ne scius kontentige respondi ĉi tiun demandon. Kaj aldone, ne la malplej

grava argumento, estas rimarkinde, ke Zamenhof, la *kreinto* mem de la lingvo, pretervidis tian «logikan» diferencan, «mallerte», laŭ la pli granda kompetenteco de la modernuloj, uzante ĉiam «*fariĝi*»!

Kvare: la «RIM.: Tiu diferenco kaj eĉ la P. V. mem ĝin ne obeas! Ni ne estas ĉiam severe obeata». Certe, kaj eĉ la P.V. mem ĝin ne obeas! Ni vidu en la artikolo «FARI» la jenajn ekzemplojn pri la verbo «*fariĝi*»: «*fariĝi* soldato, esperantisto»: ĉu sub la influo de ia «ekstera kaŭzo»? La sekvanta estas mistranskribita: «en infano vidiĝas, *kiel* homo *fariĝos*»: ne «*kiel*», sed «*kiA*»! Ĉu ankaŭ la infano *fariĝos* homo pro ia «ekstera kaŭzo»? Kaj tiu «*vidiĝas*»: ĉu ĝi estus «*iĝas* vidata» aŭ «*fariĝas* vidata»?

Fine: en la sama P.V., artikoloj BENI kaj PENI, estas prezentita la jena maksimumo, atribuita al Zamenhof: «el peno *iĝas* beno». Ĉu eble?! Mi jam legis la verkojn de la majstro, ekzamenante linion post linio, sennombrajn fojojn; mi ne ĉesas iun aŭ alian plej atente esplori, kaj ne vidis tian vere miregigan strangajon!

*Porto Carreiro Neto, Ak.*

(Fino de paĝo 13)

En la libro estas belaj vinjetoj, erudicia komentario, glosaro de neologismoj k.a. Ĝin studante oni konstatas, ke Esperanto, same kiel ĉiuj kulturlingvoj, havas diversajn stilniveleojn: por ĉiutaga vivo, por ordinara prozo, por scienco kaj fine por la alta poezio.

Papero, revizio, preso plej bonaj. Nepre parkerinda libro.

*I. G. B.*

## APERFEIÇOE SEU CONHECIMENTO

### PÔR DE SOL

A tarde descia, calma, radiosa, sem um estremecer de folhagem. . . Do lado do mar, subia uma maravilhosa côr de ouro, pálido, que ia no alto diluir o azul e lhe dava um branco indeciso e opalino, um tom de desmaio doce, e o arvoredo cobria-se todo de uma tinta loura, delicada e dormente. Todos os rumores tomavam uma suavidade de suspiro perdido. Nenhum contôrno se movia, como na imobilidade de um êxtase. E as casas voltadas para o poente, com uma ou outra janela acesa em brasa, os cimos redondos das árvores apinhadas, descendo a serra numa espêssa debandada para o vale, tudo parecia ficar de repente parado, num recolhimento melancólico e grave, olhando a partida do sol que mergulhava lentamente no mar.

### EÇA DE QUEIROZ

Eis belo trecho do grande escritor português. Nossos leitores que o traduzirem, encontrarão sua tradução, para confronto, no número seguinte.

## La Unua Libro

La Unua Libro de L. L. Zamenhof, publikigita sub la pseŭdonimo «Dr. Esperanto», en la lingvo rusa, aperis la 26-an de Julio 1887, laŭ la okcident-eŭropa Gregoria kalendaro. La dato 14 de Julio estas tiu, sed laŭ la Rusa Kalendaro.

## HELEN KELLER PELO ESPERANTO

Refere a revista *Espero Katolika*, número de Junho último, que o importante semanário austríaco *Die Furche* (O Sulco), edição de 19 de Maio anterior, contém uma entrevista com a famosa escritora cega-surda Helen Keller, entrevista que foi concedida à Dra. Anne-Marie Innerebner, em Innsbruck.

Nessa entrevista se lê o seguinte: «Conversámos principalmente em inglês, mas também em alemão. Helen Keller domina muito bem a língua alemã. Fiquei sabendo que ela conhece, além do francês, do grego e do latim, também um tanto do espanhol, do italiano e do Esperanto. A escritora vê nesta última língua um grande futuro para os seus companheiros de sorte. O primeiro auxílio para os cegos e os surdos pode vir somente das suas próprias fileiras, opinou ela, afirmando ainda que quanto mais eles se mantiverem coesos além de tôdas as fronteiras, tanto maior será o seu auxílio. Mas para uma *intercompreensão supernacional* é necessária igualmente uma *língua supernacional* para evitar as traduções complicadas e defeituosas.

Entre os cegos mesmos cresce o círculo dos esperantistas».

## NAULINGVA ETIMOLOGIA LEKSIKONO

por Louis Bastien

Esperanto, latim, francês, italiano, espanhol, português, alemão, inglês, russo

Encadernado Cr\$ 150,00



## FLAVA KASTELO

Antaŭ kelka tempo amiko kaj kolego donacis al mi tre interesan verkon de la brazila verkisto Gastão Penalva — «O aleijadinho de Vila Rica». (1)

Legante ĝin, mi trovis en la komenco de la ĉapitro «Ouro Preto dos estudantes» (O. P. de la studentoj) la jenon: — La *republicas* (2) okupas vastajn domegojn, kaj havas strangajn nomojn, kiuj signas plaĉajn kontrastojn de grandeco kaj mizero. Oni vidas ofte okulfrapantajn ŝildojn: *Flavo Castelo*, kie oni nur parolis Esperanton; *Humaitá, 15 de Novembro*, *Ilha dos Rijos* (insulo de la Fortuloj), *Solar dos Lindos* (Nobelloĝejo de la Beluloj), *Castelo dos Nobres* (Kastelo de la Nobeloj), *Mansão dos Prontos* (Palaco de la Senmonuloj), *Tonel de Diógenes* (Barelo de Diogeno), *Dez Preparados* (Dek Kleruloj), *Cinco Diabos* (Kvin diablojn), *Bastilha* (Basti-


lo), *Jardim da Infância* (Patrina Lernejo, kie loĝas la barbaĉuloj)».

La deveno de la ŝildo *Flavo Castelo* estas la jena: En la komenco de la jaro 1904 mi transloĝiĝis el la urbo Além-Paraíba, kie loĝis mia familio, al Ouro-Preto por studi en la tiea Farmacia Lernejo. Tie mi ricevis la unuan ekzempleron de la libreto «Primeira lições de Esperanto», mia traduko de «Premières leçons d'Espéranto», de Prof. Theophile Cart.

La traduko estis farita laŭ peto de T. Cart, kiu skribis al mi: «La tuta profito de la vendado de la Unuaj Lecionoj estos por la propagando inter la blinduloj. Hachette do nenion donas al tradukanto, kiel aŭtora kompenŝaĵo por lia laboro. Se vi volas havi la grandan komplezon fari la tradukon, mi estos tre feliĉa kaj al vi tre dankema».

La 19-an de Marto 1904 Cart skribis:

«Mi sendas al vi la unuan ekzempleron de nia gramatiketo. Mi skribas



Familio de Dumvivaj Membroj: D-ro Luís de Azeredo Coutinho, edziĝo kaj filino (Luisa Maria), Belo Horizonte, Oktobro 1956.

samtempe al Hachette, por ke li sendu al vi 25 ekzemplerojn, donace. Nun mi esperas ke oni povas labori en Brazilo...»

Al brazilaj gazetoj mi sendis kelkajn ekzemplerojn, kaj la ceterajn mi disdonis al kolegoj, dezirantaj koni la novan lingvon. Ĉiuj estis lernantoj pri farmacio, el la ŝtatoj São-Paulo kaj Minas-Gerais. Sekve mi organizis malgrandan elementan kurson de Esperanto, kies unuan lecionon, la 21-an de Julio 1904 mi faris ĉe la *república Castelo Amarelo* (Flava Kastelo), situanta tuj post la fama *república da Bastilha*, en la strato Pilar.

Ĝi estis la unua Esperanto-kurso farita en Brazilo. La fasado de la duetaĝa domo en kiu funkciis la *república* estis flave pentrita. Tial la studentoj tie loĝantaj, kiuj antaŭe estis metintaj sur la balkonon la ŝildon kun la portugaliaj vortoj — *Castelo Amarelo*, esperantigis la nomon, kaj eble la unuan fojon oni legis en Brazilo Esperantan titolon: Flava Kastelo. Tiel ĝi daŭris dum multaj jaroj. Hazarde mi vidis, ke la *Seleta* (Krestomatio) de Lucia Alvarenga, pecoj de brazilaj aŭtoroj, (4-a eldono, 1946) ankaŭ enhavas la pecon de la libro de Penalva pri la *república Flavo Castelo* kaj aliaj en Ouro-Preto. Ĉu la postaj generacioj de studentoj modifis la Esperantan ŝildon kaj ĝin denove portugalgigis? Bedaŭrinde...

#### A. Caetano Coutinho

(1) Pr. *valejĵadinju di Vila-rika* (la Kripuleto de Vila-Rica, António Francisco Lisboa, fama brazila skulptisto). Vila-Rica estis la primitiva nomo de Ouro-Preto, la tradicia ekscelfurbo de la Stato Minas-Gerais.

(2) *Repúblikas*, privataj komunologiejoj de studentoj, laŭ la studenta slango.

## UMA PERGUNTA E TRÊS RESPOSTAS

*Qual a sua opinião sobre a adoção do Esperanto, como Língua Auxiliar Internacional?*

1 — O Dr. Oto Guerra, director do jornal "A Ordem", assim respondeu à nossa pergunta:

"Acho que tudo quanto aproxime os homens, numa era em que tantas são as superações, deve merecer os mais francos aplausos. O Esperanto corao língua internacional auxiliar é mais um elo — e forte, para o entendimento dos homens."

2 — Otoniel Meneses, o príncipe dos poetas e funcionário do Instituto Nacional do Sal, disse o seguinte:

"Embora de tão mofina importância, minha opinião é a de que o Esperanto, o idioma auxiliar, generosa criação de Zamenhof, ainda acima das fronteiras territoriais, dos credos religiosos e dos sistemas políticos, como acontece com a Cruz Vermelha (e mais ainda, desde que seu domínio é no terreno do Espírito), é uma grande esperança de concórdia universal, entre todos os homens de boa vontade."

3 — O Dr. Paulo Gomes da Costa, advogado e professor de espanhol do Colégio Estadual, assim se expressou ao repórter:

"A adoção do idioma do Dr. Esperanto, pseudónimo do seu idealizador, trará maior compreensão entre os homens e facilitará, grandemente, as actividades científicas, comerciais e políticas entre as nações.

Os políglotas passariam a ser apenas bilingues, desde que não precisariam gravar termos nos mais diversos idiomas.

A *Internacia Lingvo* é uma realidade incontestável e a sua adoção, oficialmente e em todos os países, permitiria a cada um de nós dizer como Diógenes: "Sou cidadão do Universo."

("Tribuna do Norte", de Natal. — 29-11-1953).



## LA MISTERO

ROMANO

**Afrânio Peixoto, Coelho Neto, Medeiros e Albuquerque, Viriato Correia**

XXVI

### EKZAMENO DE KONSCIENCO

Kiam Petro Albergaria eliris el la domo de Rosa, li estis avida je novaĵoj.

Li estis tute konsterninta la maljunan Bartolomeon per la scio, ke liaj suspektoj estas malveraj. Tiel kruela li estis, ke elirante li diris moke al la maljunulo, ke li prezentu liajn komplimentojn al Rosa.

Sur la strato li aĉetis la ĵurnalojn kaj tiam povis scii tion, kio okazis al Petro Linck. La ĵurnalo, kiun li vidis ĉe sia amorantino, estis tiu, ŭiu aperigis malpli da informoj.

La usonano provis komence nei iun partoprenon en la afero. Fakte li estis arestila ne sciante, kiujn indicojn la polico havas. Sed la ŝerlokoj de Santos estis agintaj kun granda lerteco.

Iu detektivo iris al la butikoj, kie li laboris, kaj portis zorge pakitan bonegan skatoleton el nigra ĉinlako. Li sin prezentis kiel vendiston de kuriozaĵoj. Linck prenis la skatoleton, malfermis ĝin, ŝatis ĝin kaj ŝajnis inklina tuj ĝin aĉeti, sed la falsa vendisto postulis tro altan prezon. La usonano fordonis ĝin. Ĝuste tion la vendisto deziris.

La detektivo prenis la skatoleton kun la silka papero, kiu envolvis ĝin, kaj portis ĝin al la polico. Nenio pli bona ol la ĉinlako, por ke oni lasu sur ĝin videblajn fingromakulojn. La skatolo estis plena de ili. La polico ekzamenis la desegnon, komparis kun la formulo de la fingraj premsignoj, kiu estis sendita al ĝi per telegrafo, kaj jam ne dubis.

Linck ne konis tiujn detalojn.

Kiam neatendite, post la unuaj neoj, ili estis elvidigitaj al li, li ne povis ne konfuziĝi. Tamen li eble estus rezistinta iomete. Sed la polico estis eltrovinta Rosan Merck.

Ankaŭ tie la esploroj estis faritaj kun lerteco. Fine, ne ĉiam la polico estas mallerta. La delegito, kiu venigis lin, diris al li, ke li faras tion pro afero de falsa mono, en kiu estas implikita virino nomata Rosa iam loĝinta en iu parto de la urbo, kie ŝi neniam loĝis.

Rosa, kiu estis enveninta plena de timo, revigliĝis. La delegito akceptis ŝiajn deklarojn. Li konversaciis. Li ŝercis. Li faris, ke ŝi regajnu sian tutan flegmon. Fine, kun senzorga mieno, li petis, ke ŝi skribu deklaron pri la afero kun neopli sia tuta partopreno.

Ĝi estis deklaro, kiun la delegito mem redaktis kaj en kiu aperis, inter multaj aliaj, ĉiuj vortoj de la letereto skribita al Petro Linck.

Li diktis kaj Rosa skribis sen iu suspekto pri la afero. Kiam li venis al la fino, la delegito metis la sorban papperon kaj, sonoriginte timpanon, enmanigis la deklaron al servisto, por ke li portu ĝin al Melo Bandeira.

Rosa volis foriri. La delegito ne permesis. Li plu konversaciis gaje. Ŝi ne sciis pri la aresto de la amoranto kaj ne pensis, ke iu danĝero minacas ŝin. Sed tiam Melo Bandeira ekaperis ĉe la pordo kaj balancis la kapon kun ĵesa gesto. Li ĵus komparis la deklaron kun la letereto kaj havis neniun dubon. Ĝi estis farita de la sama mano.

La delegito fariĝis tuj gravamiena kaj ordonis, ke oni arestu la virinon, surprizitan.

— Arestita kial? — ŝi demandis.

— Tial, ke vi estis la incitanta al la murdo de la bankiero Sanches Lobo.

— Sed ĝi ne estis mi. Petro mortigis tial, ke li volis mortigi.

Tion ŝi diris senpripense. Sed ĝi estis decidiga. Premita per demandoj, ŝi fine konfesis, ke la krimo estis reale plenumita de Petro Linck.

Kiam ŝi tiu vidis la pruvon de la fingromakuloj malkaŝantaj, la komparon de la skribkaraktero de Rosa en la deklaro kaj en la letereto kaj fine sciigis pri ŝia konfeso, vidis, ke li estas perdita kaj konfesis ĉion.

La interesa afero estas, ke lia konvinko esti la murdinto de Sanches Lobo kondukis lin tiel malproksimen, ke li diris, ke la bankiero estas kun dorso al la pordo de la kabineto kaj dormas.

— Kaj kiel vi vidis, ke li dormas?

— Tial, ke mi aŭdis lin ronki malprofunde.

Tiu detalo tute falsa kaj kompromitanta lin estis iluzio de lia memoro. Sendube, por ke li sciis, ke Sanches Lobo dormas, estis necese, ke li havu signon tiaspeca: aŭ ke li vidu lin spiri, aŭ ke li aŭdu lin ronki. Sed li inventis, kontraŭsian intereson, tiun detalon.

Sentante, ke tio devis okazi tiel, li konsideris la aferon, kiel se li konstatis ĝin.

Petro Albergaria legis tiun konfeson kun vera mirego.

Sed la polico opiniis, ke la usonano, konfesante la ŝtelon de biloj kaj valoraĵoj, neis tiun de la ducent mil mil-rejsoj por lasi ilin kaŝitaj en iu punkto kaj poste, fininte la punon aŭ absoluta de iu juĝantaro, preni ilin.

Koncerne la gantojn kaj la tenisajn botetojn Linck ankaŭ neis, ke ili apartenas al li kaj ke li utiligis ilin. Tiuj objektoj restis en la akvo, pasis en tiom da manoj, ke ili ne povis liveri postsignojn. Plie, la fakto, ke oni trovis botojn kaj gantojn je pluraj kilometroj da distanco de la loko, kie oni faris krimon, neniel pruvis, ke ili rilatiĝas kun la afero.

Tio, kion la gazetaro nomis la kontraŭdiroj de Petro Linck, estis aferoj, kiuj al Petro Albergaria konfirmis la vercon de la krimulo.

Fakte, li trovis la monkeston malfermita; fakte, li ŝtelis la ducent mil mil-rejsojn; fakte, la gantoj kaj la botetoj apartenis al li... Sed tio ŝajnis nekredela al la Polico.

Melo Bandeira estis la sola, kiu obstinis dum kelka tempo supozi la ekzistadon de du krimuloj. Sed li ne parolis pri tio al iu.

Petro Albergaria, legante la sciigojn, faris trankvile sian ekzamenon de kons-

cienco. Alia viro estis kondamnata anstataŭ li: ĉu li devus sin prezenti?

— Ne.

Kviete, studante la faktojn sen iu malkuraĝa intenco senkulpiĝi sin, li komparis la aferojn.

Li ne estis murdinto pro deziro de riĉaĵoj. Li faris venĝon tute justan. Li punis homon punindan. Li sentis, ke el la fundo de ŝia tombo, lia patrino diras: "Vi bone agis!"

Kaj li agis tiel.

Ĉu li ŝtelis? — Tio estis vero. Sed ĉio, kion li portis, estis nur malgranda redono. Li preskaŭ ne meritis, en bona justeco, la nomon de ŝtelinto.

Petro Linck, male, ne; estis alia afero. Li mortigis por ŝteli.

Albergaria num demandis al si mem, ĉu li tute sufokis la bankieron, aŭ ĉu ĉi tiu, nur nedaŭre sufokita, rekonsciigis, kiam Linck eniris.

Tio ne estis vero. Albergaria reale mortigis Sanches Lobo. Linck iluziigis, se li pensas, ke li aŭdis iun ronki.

Sed, kiel ajn, li estis animo de krimulo. Li meritis la punon, kiun oni trudus al li, eĉ severan.

Kaj en sia animo kaj konscienco Albergaria restis trankvila.


MEDEIROS E ALBUQUERQUE. Tradukis K.

## La Fundo de L'Mizero

Tiu ĉi verko de Vaclav Sierozewski (Sieroŝevski) estis bonege tradukita de Kabe, kun la permeso de la aŭtoro, el la pola lingvo, kaj presita ĉe la librejo Hachette et Cie, Parizo, en 1904. La volumo estas 92-paĝa.

Nia samideano G. Sapunĝlev, bulgara ĵurnalisto, tradukis la Esperantan eldonon en la bulgaran lingvon kaj prestigis sian tradukon en bulgaraj gazetoj.

La verko temas pri mizera vivo de lepruloj en Siberiaj arbaroj, kaj estas treege emocia.



**EZOPA SAĜO** — sepdek sep fabloj verse reverkitaj de K. Kalocsay. — Eldonejo Koko — Komununa Konversacia Klubo. — Kopenhago — 1956. 1 vol. 127 p. 12,5 x 20 cm. Prezo ĉe la Libro-servo de B.E.L. Cr\$ 130,00 en bela bindaĵo.

Vi jam konas la fablojn de Ezopo. Kiu ne konas ilin en la mondo? Ili estas tradukitaj en ĉiujn lingvojn kaj ĉiam represataj. Kiam vi lernis la francan lingvon, vi denove legis ilin en la tradukoj de La Fontaine; kiam vi ŝvitis super la latina, vi alian fojon legis ilin en la tradukoj de Phaedrus. La moralisto naskiĝis en la jaro 550-a antaŭ Kristo, kaj restas ĉiam freŝa en la koro de la homaro. Vi jam konas ilin, sed ne en nia lingvo, en la riĉa poezia stilo de la majstro de la esperantistaj poetoj, K. Kalocsay, kiel ili aperas nun.

Legu mem:

### LIBERO

*Liberon plenan ĝuis iam la ĉeval' laŭplaĉe kuradis en la kampo, tra la val'. Alvenis foje kaj ofendis ĝin la cerv'*

## Recenzo

*per malklarigo de fonto kaj huftreto*  
[de herb'.

*Ĝi volis venĝi, sed kun pli rapida sving' la cervo kuris: Ĝi fiaskis pri l' ating'. Koleru en ĝi bolis, kaj ĝi, en impet' nun al la homo turnis sin kun helpo-*  
[-pet'.

*Ĉi tiu diris: «Bone, la cervon ĉasos mi, se bridon, selon al vi meti lasos vi.» La cervon murdis la ĉasist! per lan-*  
[cotraf',  
*Sed la ĉeval' por ĉiam iĝis lia sklav'.*

Rigardu la nunan mondon, la protektoratojn, kaj diru ĉu tiu poeto ne estas tute aktuala, kvankam lin oni mortigis antaŭ 2.500 jaroj?

Igu viajn lernantojn parkeri ankaŭ tiun ĉi fableton:

### MASTROŜANĜO

*Kampur' azenon paŝtas sur herbejo, lin frapas bru' de malamik-armeo. «Ni kuru, kuru! — krias li ekscite — Oni nin kaptos!» Sed la besto spite obstinas, respondante: «Ĉu vi kredas, ke l' malamik' du selojn sur min*  
[metos?»

*«Nu, ne!» «Ej! Mastro, ĉu do ne egale, sub kies ŝarĝo ĝemas mi fatale?».*


(Fino sur la paĝo 7)

## IDIOTISMOS NACIONAIS

A. COUTO FERNANDES

|  |  |
|--|--|
| Ele está sempre mexendo comigo . . . . .                   | Li ĉiam incitadas min.   |
| Tesourar alguém. . . . .                                   | Akre kritiki iun.  |
| Tomou bomba no exame. . . . .                              | Li malsukcesis en la ekzameno.   |
| Estar nas suas quintas. . . . .                            | Vivi kiel kuko en butero (Z.).   |
| Estar na pindaíba. . . . .                                 | Esti senmona.  |
| Cair na esparrela. . . . .                                 | Lasi sin kapti de trompuloj, per flatoj,<br>per lertaj vortoj.         |
| Pagar o pato. . . . .                                      | Pagi sen partopreno por fremda festeno.                                |
| Isso é para inglês ver. . . . .                            | Tio estas trompoŝajno.   |
| Testa de ferro. . . . .                                    | Ŝajna respondanto.   |
| Caiporismo. Macaca. . . . .                                | Konstanta malbonŝanco.   |
| Nascer empelicado. . . . .                                 | Esti naskiĝe bonŝanculo.   |
| Questões de lana-caprina. . . . .                          | Senmotiva kverelo.   |
| Pegar no bico da chaleira de alguém . . .                  | Flataĉi iun.   |
| Deixar correr o marfim. . . . .                            | Tute ne peni.  |
| Descalçar a bota. . . . .                                  | Sin liberigi de ĝenaĵo.  |
| A torto e a direito. Aos trancos e bar-<br>rancos. . . . . | Trafe maltrafe.  |
| Pôr uma pedra em cima. . . . .                             | Formeti la aferon en la keston de l' for-<br>geso. Formeti en arkivon. |
| Pregar uma peça a alguém. . . . .                          | Lerte trompi iun.  |
| Ele tem bicho carpinteiro. . . . .                         | Li estas moviĝemulo.   |
| Matar o bicho. . . . .                                     | Trinki brandgluton.  |
| Enfiar uma agulha. . . . .                                 | Enkudriligi fadenon.   |
| Jurar bandeira. . . . .                                    | Soldatiĝi.   |
| Faz calor. Faz frio. . . . .                               | Estas varme. Estas malvarme.   |
| Fazer cauda. . . . .                                       | Atendi stare en la vico.   |
| Calar o bico. . . . .                                      | Ŝtopi la buŝon. Silentiĝi.   |
| Isso é uma estopada. . . . .                               | Tio estas tedegaĵo.  |
| Ficar para tia. . . . .                                    | Resti maljuna knabino.   |
| Ele está frito. . . . .                                    | Li estas tute perdita.   |
| Saíu bufando. . . . .                                      | Li foriris interne furioza.  |
| Meter os pés pelas mãos. . . . .                           | Konfuziĝi.   |
| Pau para toda obra. . . . .                                | Ĉiotaŭgulo.  |
| A talho de foice . . . . .                                 | Ĝustatempe, oportune.  |
| A toque de caixa. . . . .                                  | Rapidege.  |
| Matar o tempo. . . . .                                     | Pasigi la tempon.  |
| Dizer por meias palavras. . . . .                          | Duondiri.  |
| Não pregar olhos. . . . .                                  | Ne dormi.  |
| Charuto quebra-queixo. . . . .                             | Cigaraĉo.  |

# Bibliografio



*Jorge Hess — ¿Sabe Usted Esperanto?*  
Curso práctico de la lengua internacional  
Ilustraciones de Carlos Wappers. 160 p.  
Buenos Aires, 1956. Liga Argentina de Esperanto — Castelli 265.

J. Hess, incansável e veterano profesor da Liga Argentina, escreveu interessante e excelente obra. "Os exercícios são atraentes, as explicações claras e breves, o vocabulário é de imediata e cotidiana aplicação, não se omite o bom humor", são palavras do prof. Enrique Bailech, no prefácio.

*Kenji Ossaka — El orienta florbedo.*  
Pro la ora jubileo de esperantisteco de la aŭtoro (1906-1956) 104 p. Tenmori, Japanujo. Enhavo: Skizoj pri japana poezio. Ĉinlingvaj kaj Luĉaj poemoj. Kantoj (kun muziknotoj en aldono). Rememoroj dolĉamaraj. Interessa verko, kies aŭtoro, ĉefinĝeniero, estas unu el la plej kleraj esperantistoj kaj laborantoj por Esperanto en Japanujo.

TRI VERKOJ DE VOLTER (Voltaire).  
*Kandid aŭ la Optimismo — Zadig aŭ la destino. Senartifikulo.* Trad. E. Lanti. Senacieca Asocio Tutmonda — Paris, 312, p. 1956. SAT aperigis la unuan eldonon de *Kandid* en 1929, jam elĉerpitan en 1937. Bone ĝi faris, donante la duan eldonon de la fama verko de Voltaire, aldonante al la volumo du aliajn notindajn verkojn de la sama aŭtoro. Certe ĉi tiu eldono ankaŭ baldaŭ elĉerpiĝos, ĉar la verko meritas legadon de niaj samideanoj.

BRANISLAV NUŠIĆ — *Suspektinda persono.* Duakta komedio, el la serbokroata lingvo Trad. Antonije Sekelj 56p. Eld. Serbia Esperanto Libro, Beograd, 1956. Amuza verketo de la konata teatra aŭtoro Nušić.

*Kumbel: GRUK.* Esperanto-eldono, tradukita de Poul Thorsen. Libro-servo Centro Dana Esperantista Ligo 1956. Presita em 100 ekzempleroj. *Gruk*, kies danaj eldonoj ĝis nun aperis en 165.700 ekzempleroj, konsistas en facetoj pri arto poetika, ĉiotagaĵoj, pli malpli sarkasmaj filozofiaj konsideroj, komentoj el la mondsituacio, fabloj, limerikoj, personaj satiroj. En la komenco estas grava averto: *Ne tranĉu la paĝojn!* Oni ne bezonas ilin tranĉi, por legi la tutan libreton. *Kumbel* estas pseŭdonimo de la dana inĝeniero Piet Hein.

*Warszawa — Varsovio — albumo,* redaktita de D. Kobielski. Enhavas nombrajn belajn fotojn kaj planojn de la pola ĉefurbo, preskaŭ tute rekonstruita post la milito. Varsovio fariĝas unu el la plej modernaj urboj de Eŭropo.

*Teatro en Societo — Kolekto da teatraĵetoj* verkita de Emilija Lapenna kaj Shertse Mulo. Rememore pri la deka datreveno de la fondiĝo de E.-Societo "Bude Borjan", em Zagreb.

POLLANDO — Eldonejo Polonia. Impona, grandformata multkolora revuo, lukse ilustrita. Ĝi aperas en la lingvoj pola, angla, franca, germana, hispana kaj rusa, kaj nun aperas ankaŭ en Esperanto. Bonega papero, 32 paĝoj. Red. adreso: Varsovio, Marzowiecka 11.

BULTENO GEPATRA. Speciala eldono. Printempo 1956. Ligilo inter gepatroj, kiuj herede transdonas Esperanton al iliaj infanoj. Redaktis kaj eldonis Ges-roj Vilma kaj Rüdiger Eichholz, 133 Service Road, Oakville, Ontario, Kanado.

VEGETARANO — Organo de Tutmonda Esperanto Vegetara Asocio. Etiko, higieno, ekonomio. Jaro XXI Somero 1956.

## Esperanto na imprensa do Brasil

Tivemos conhecimento dos seguintes periódicos de vários Estados, que inseriram artigos, notícias e comentários favoráveis ao Esperanto:

**Rio Grande do Norte:** — *Diário de Natal* (Esperanto e Esperantismo, crônicas de Arlindo Castor de Lima); *O Jornal de Natal* (reproduz as palestras da Associação Potiguar de Esperanto, no programa "Esperanto em foco"); *O Poty* (Crônicas de A. Castor de Lima); *Jornal do Comércio*; *A República*; *Milho Verde* (revuo), de Natal. *O Mossoroense*, de Mossoró (seção esperantista, de A. C. de Lima). *Tribuna do Norte*, também de Natal.

**Pernambuco:** *Jornal de Cavaleiro de Cavaleiro*, Jaboatão.

**Alagoas:** *Gazeta de Alagoas* (série de artigos do veterano Paulino Santiago), de Maceió.

**Bahia:** *O Intransigente e Voz de Itabuna*, de Itabuna.

**Estado do Rio de Janeiro:** *O Estado*; SEPE, órgão oficial da Sociedade de Estudos e Pesquisas Espiritas (artigo do professor Octavio Peixoto); *O Ensaio*, órgão do Centro Alberto de Oliveira, do Colégio Bittencourt Silva, de Niterói.

**Minas Gerais:** *O Diário*, de Belo Horizonte; *Cidade de Barbacena*, de Barbacena; *A Tarde e Gazeta Comercial*, de Juiz de Fora; *A Flâmula*, de Cláudio.

**Mato Grosso:** *Alvorada*, boletim social da União Beneficente dos Sub-Tenentes e Sargentos de Mato Grosso.

**São Paulo:** *A Gazeta* (reportagem de O. Pires de Holanda com o prof. Elio Mi-

gliorini) e *A Imprensa* (mensário da Escola de Jornalismo Casper Líbero), de São Paulo cap.; *A Voz do Vale do Paraíba* (série de artigos de Fr. Jaime Pereira), de Taubaté; *Folha do Povo*, de Jacareí.

**Paraná:** Boletim de Rotary Clube de Curitiba; *Noasso Jornal*, de Rio Negro; *Noroeste* (art. de Pedro Real), de Paranaíba.

**Santa Catarina:** *Jornal de Mafra*, *O Luzeiro* e *O Noticiário da Fronteira*, de Mafra.

**Rio Grande do Sul:** *Reencarnação*, de Porto Alegre; *Jornal da Tarde* de Pelotas.

**Rio de Janeiro, D. F.:** *Correio da Manhã*; *Jornal do Brasil*, *Diário de Notícias*, *Diário Oficial*, *O Jornal*, *Jornal do Commercio*, *O Globo*, *Última Hora* (Centro de E. em Paris e reportagem sobre Esperanto, de Ed. Bailby), *Tribuna de Imprensa*, *Boa Vontade*, (órgão da Legião de Boa Vontade), *Novo Horizonte*, *Revista do Clube Militar* (arts. do Major Geraldo Pádua), *Reformador*, órgão da Federação Espirita Brasileira (em todos os números notícias, artigos e trechos em Esperanto), *Sesinho* (seção sobre Esperanto — em todos os números, de Irani B. Araujo).

---

### DOIS LIVROS INDISPENSÁVEIS

**Plena Vortaro. Enc. . . . . 220,00**

**Fundamenta Krestomatio.**

**Enc. . . . . 220,00**

**LIBROSERVO DE B.E.L.**

---

### CURSOS DE ESPERANTO POR CORRESPONDÊNCIA

**Contribuição única**

**Cr\$**

- 1.º grau — ELEMENTAR**  
(incluído o livro) . **200,00**
- 2.º grau — SUPERIOR** . **400,00**
- 3.º grau — MAGISTRAL** **800,00**

---

Red. A. Andrieu, à Salusses, par Montsalès (Aveyron) Francujo. Prezo: 2 int. rkp.

**MONDO** — Impona monata gazeto el Belgujo. Eldonoj em franca kaj nederlanda lingvoj. Enhavas informojn kaj artikolojn pri Esperanto, kaj lecionon de E.-kurso. De ĉiuj artikoloj ĝi donas resumon en Esperanto.